



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

La 71-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Hungario

Prelegos: Oldřich Arnošt Fischer

La 71-a kongreso de KELI okazis ekde la 16-an ĝis la 23-an de julio 2022 en hungara vilaĝo Domaszék, kie situas kristana kleriga centro. Temo de la kongreso estis: „kaj Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili“ Agoj de Apostoloj 15, 9.

En la kongreso partoprenis 23 esperantistoj el Hungario, Pollando, Slovakio, Svisio, Svedio, Francio kaj Ĉeĥa Respubliko. Krome interesaj prelegoj (Mikuláš Lexmann, nekonata esperantisto kaj martiro, Vasilij Jakovleviĉ Jeroŝenko – mia heroo, Dietrich Bonhoeffer, Ni kaj ili, La 7 novaj mortomeritaj pektoj, Albert Schweitzer, Jean Henri Dunant, Iom lingve, Historio de Ukrainio) ni diskutis pri la temo de la kongreso, ĉar ni bone scias, ke homoj ofte faras grandajn diferencojn inter ili mem, malgraŭ ke ni ĉiuj estas infanoj de unu Dio.

Ni vizitis urbon Szeged kaj subĉielan historian muzeon en Ópusztaszer, konatiĝis kun hungara popola muziko kaj dancoj.

Venonta kongreso de KELI okazos en Pollando (Bjalistoko, 5 – 12 aŭgusto 2023).

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 16-an de novembro 2022 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Origine planita prelego de Martin Sedlák pri Energia reto okazos la 18-an de januaro 2023.



Cetera programo en novembro

La 23-an **Reta trompado** – Milan Kolka, rete per Skajpo

La 30-an **Tuberkulozo** – Oldřich Arnošt Fischer, Občanský klub, Hybešova 65a

Programo en decembro

La 7-an **Advento, kristnasko kaj nova jaro** – komuna renkontiĝo kun PEA Gliwice, rete per Zoom

La 14-an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por januara kaj februara programo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/EO/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/@esperantobrno) (<https://www.youtube.com/@esperantobrno>).

Milan Kolka
prezidanto